

Tutjara raporto el la funkciado de Cifereca Arkivo de Pola Esperanto-Asocio

2025 - 2026 (ŝtato de 28 de julio 2026 j.)



enhavo kaj teknika prilaborado: Bartłomiej Jezierski, Kuratoro de la Cifereca PEA-Arkivo

“Ni vivas en la epoko de
arĥivo. Nia ebleco al
konservado [...] estas
hodiaŭ pli granda ol
iam antaŭe. Sed en
cifereca mondo ĉio povas
esti konservita,
kaj malmulte da aĵoj estas
vere konservitaj.”

~ David S. Ferriero

Pri la signifo kaj potenco de arkivistiko kiel scienco ni ekkomprenas jam delonge kaj en multegaj kontekstoj. Mi citos ĉi tien la historia ekzemplo - Kmeroj la Ruĝaj post grandegaj krimoj restis grandaj arkivoj, kien laboreme ili skribadis la biografiojn de viktimoj. Sed arkivoj ne estas nur reĝimoj, sed ankaŭ la aferoj pli proksimaj de nia ĉiutageco: nia literatura tradicio, fotografioj, komputila programaro ktp. devas esti sub arkivado por ke ili estus haveblaj por interesuloj en futuro - en la mondo, en kiu informadiko ŝanĝiĝas tuttempe - *futuro* - aŭ ŝanĝo de formato de dosiero - povas okazi ĉiutage.

La problemo de manko de arkivoj ŝajnas esti precipe videbla en esperantista movado, kien provas kontraŭstari societaj projektoj (ekz. Bitarkivo - <http://bitarkivo.org>), ciferecaj bibliotekoj (ekz. Podlaska Biblioteka Cyfrowa aŭ Polona - listigante nur polajn iniciatiojn) aŭ enlandaj Esperanto-asociojn (francoj kaj italoj havas siajn tiutipajn projektojn). Anakŭ poloj kreis sian propran ciferecan arkivon de esperantista movado, ĝi estas **Cifereca Arkivo de Pola Esperanta-Asocio**, kia tutjara raporto estas publikita. Bedaŭrinde, UEA estas pasiva al tiu ĉi modo kaj ŝajnas, ke Universala Esperanto-Asocio ne organizos sian ciferecan arkivon - sed tamen ĝi povus helpi pli bone kompreni genezon de problemojn kaj skandalojn en societo (ekz. nefunkcia sistemo AKSO). En tiu ĉi jaro ni faris sukcesojn, kiujn malvermis la vojon por arkivado de Esperanto-movado en lando kaj vekas esperon pri sukceso de nia inicjato pli granda ol malnovaj lernolibroj. En prilaborado estas servo de gazetaĵoj en Pola Popola Respubliko; tamen laboro ne estas farata rapide, ĉar arkivulo ne ricevis tutan materialon - ni atendas senpacience. Kunlaboro kun Krzysztof Śliwiński ankaŭ montras, ke egzistas ebleco krepaci de jam kvardekjaraj ranetojn, divigidantajn esperantista movado en Pollando.

En tiu ĉi kalendara jaro (arkivo estis publikita 5 de aŭgusto 2025 r., arkiva sekcio komenciĝis laborojn en dua duono de junio de tiu ĉi jaro) oni sukcesis fari:

- oni publikigis entute 18 arkivaj rimedoj, ne kalkulante aldonajoj (kiel ekz. sonregistraĵoj al lernolibroj) por elŝutado + 4 numeroj de *Informilo de Esperanta Arkivo* transdonitaj de sinjoro Ŝliwiński, du rimedoj estas pretaj por publikigo kaj aliaj du estas en preparo;
- oni kreis modernan, klaran kaj laŭ generale akceptitaj normoj arkivo la cifereca, kiu daŭre estas evoluigata per privataj rimedoj de Kuratoro kaj per PEA-rimedoj, atingeblaj en ambaŭ lingvoj kaj malluma reĝimo, konsistiganta reprezenta vitrino enlande kaj eksterlande - pri ni menciis interalie la gazeto *La Ondo de Esperanto*, la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio transdonis korajn gratulojn al la arkivulo;
- paralele estis evoluigitaj kontaktoj kun plej gravaj centroj de esperantista movado en lando: Varsovio, Lodzo kaj Bjalistoko;
- estis kreita teknika infrastrukturo, kapabla ciferecigi la plimulton de tipaj arkivaj materialoj, kiel interalie vinildiskoj, sonkasedoj kaj libroj, ankaŭ per fotografia metodo;
- oni ankaŭ kopias malfacile arileblajn aŭ esceptajn esperantlingvajn ciferecejn datumojn;
- al la plej gravaj centroj de la Esperanto-movado en lando estas sendataj petoj kun demandoj pri sendo de malfacile atingeblaj materialoj por faciligi la laboron de la arkivulo;
- oni faras ampleksan analizon de la materialoj havantan en Varsovio kaj Lodzo, kio ne estas facila pro la nuna ŝanĝo de sidejo de PEA;
- oni prefaras servon de gazetartikoloj antaŭe menciitaj;
- ni establas kunlaboron kun la plej gravaj esperantistoj en la Pollando.

La tuta gamo de tiu ĉi laboro rilataj al la prilaborado kaj publikigo estas farata de unu sola persono en ŝia libertempo, ĉefe dum la ferioj, inter lernado en teknikumo. Konsiderante ĉi tiun faktoron, oni povas konkludi, ke la laboroj estas farataj en vere alta tempo. Kompreneble, la resto de la Asocio kaj aliaj esperantistoj ne montras pasivecon al nia iniciato; mi kore dankas sinjoron Robert Kamiński pro la materia kaj enhava helpo kaj Ireneusz Bobrzak pro la helpo - same materia kaj enhava, ankaŭ en la realigo de la petoj. Mi volas danki ankaŭ al mortinta Przemysław Wierzbowski, kiu ankaŭ partoprenis en la laboroj pri la unuaj versioj de la arkivo kaj transdonis sufiĉe grandan nombron da libroj, pri kio ni memoros.

Malgraŭ la limigoj de tempo, kaj de la arkivulo kaj de la esperantistoj en lando, la Arkivo rigardas estontecen - ni intencas evoluigi la ĝisnunajn direktojn de agado, koncentrigante je la sekvaj kampoj:

1. finigo de laboroj kaj publikigo de la servo kun gazetaj eltondaĵoj;
2. la evoluo de nacia kaj internacia kunlaboro;
3. plivastigo de maŝinparko por ebligi ciferecigon ankaŭ de vidkasedoj;
4. daŭrigo de la sendado de petoj, ampleksantaj: a) aŭdajn kaj videajn registraĵojn en Esperanto eldonitajn en Pollando; b) esperantajn kantarojn eldonitajn en nia lando; c) plian kunlaboron kun s-ro Ŝliwiński; d) plian serĉadon kaj publikigon de interesaj arkivaj rimedoj, precipe unuaj eldonitaj Esperanto-lernolibroj

sur la pola tero;

5. popularigo de Esperanto kaj Arkivo, ankaŭ popularigo problemaro pri ciferecigo de materialoj, kaj en Esperanto kaj ĝenerale;

6. antaŭenigo de la iniciato inter la esperanta komunumo.

La pasinta jaro montris, ke eĉ modestaj tempoj kaj personaraj rimedoj, determinataj de kunlaboro inter samideanoj, povas alporti mezureblajn efikojn por la konservado de la heredaĵo de la polaj esperantistoj. Kvankam la vojo antaŭ ni estas longa, kaj la rimedoj limigitaj, ni daŭre kredas, ke ĉiu ciferecigita dokumento estas restarigo de la memoro pri la homoj kaj ideoj, kiuj dum pli ol cent jaroj formis la esperantan movadon. Kompreneble, tio ne signidas fermon de projekto - ni laboros plu kaj ni kuraĝigas al kontakto, kunlaboro kaj subteno. ni dankas al ĉiuj subtenantoj. Rememorigante la citaĵon el la komenco de niaj konsideroj, oni povas konkludi, ke ni vivas en la epoko de arkivoj kaj ni klopodas samtempe, ke la esperanta ĉapitro de la mondhistorio ne estu forgesita. Ni dankas ankaŭ pro la komuna laboro kaj ni invitas al plia kunlaboro.